Joseph M. Scriven ,

# Trans imag' Jesu' amikas

*tradukita de Reinhard Pflüger*

Trans imag' Jesu' amikas -
kia la privilegi',
ke li portas nian ŝuldon.
Preĝe donu ĝin al li.
Kiom ni disipas ŝancojn
pri anima harmoni',
sole ĉar ni rezignadas
preĝe turni nin al li.

En danĝero kaj aflikto,
tento kaj eĉ tragedi'
ni neniam malesperu.
Preĝe prenu ĝin al li,
la fidela akompano.
Amikec' ne eblas pli.
Konas li malforton ĉian,
preĝe portu ĝin al li.

Zorgoŝarĝo ofte pezas,
kaj senfina la defi'.
Ĉion la Savant' superas.
Preĝe fuĝu ni al li.
Se forturnas sin amikoj,
preĝe diru ĝin al li.
Vin konsole ĉirkaŭbrakos
la Unika sen kopi'.

Vi, Savant', promesis porti
ŝarĝojn niajn tie ĉi.
Tial ilin ni demetu
ĉiujn preĝe nur ĉe vi.
Baldaŭ preĝoj ne necesos
ĉe la brila tron' de Di'.
Ĝis etern' ni restos rave
en ador' kaj laŭd' al Li.

...

Joseph M. Scriven ,

# Ho Jesu', amiko mia

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ho Jesu', amiko mia,
Kiel alta estas vi!
Estas vi peranto nia,
Kiu ligas nin kun Di'.
Kiom da aflikto devas
Nenecese porti ni,
Se preĝante, Lin serĉante
Ni ne turnas nin al Li.

Kiam la diablo tentas
Nin kun ega energi',
Ni ne devas timi ion,
Se kredeme preĝas ni.
Jen montriĝas la fidelo
De Jesu', nin helpas Li,
Kiel la Savant' potenca.
Tiun preĝe petu ni.

Se ni estas zorgoplenaj
Kaj nin premas tio ĉi,
Certe helpas nin Jesuo,
Niajn preĝojn aŭdas Li.
Se amikoj vin forlasas,
Diru tion nur al Li!
Li vin ŝirmos kaj konsolos.
Nur al Li vin turnu vi.

Ho Savanto, Vi promesis,
Ke Vi portos ja por ni
Niajn ŝarĝojn, ni do portu
Ĉion preĝe nur al vi.
Baldaŭ ni ne devos preĝi
Plu sur tiu Tero ĉi,
Tie ni senfine gloros
Vin en eternec', ho Di'.

...

Joseph M. Scriven ,

# Welch ein Freund ist unser Jesus

*tradukita de Tr. Ernst Gebhardt*

Welch ein Freund ist unser Jesus,
O, wie hoch ist er erhöht!
Er hat uns mit Gott versöhnet
Und vertritt uns im Gebet.
Wer mag sagen und ermessen,
Wieviel Heil verloren geht,
Wenn wir nicht zu ihm uns wenden
Und ihn suchen im Gebet!

Wenn des Feindes Macht uns drohet
Und manch Sturmwind um uns weht,
Brauchen wir uns nicht zu fürchten,
Stehn wir gläubig im Gebet.
Da erweist sich Jesu Treue,
Wie er uns zur Seite steht,
Als ein mächtiger Erretter,
Der erhört ein ernst Gebet.

Sind mit Sorgen wir beladen,
Sei es frühe oder spät,
Hilft uns sicher unser Jesus,
Fliehn zu ihm wir im Gebet.
Sind von Freunden wir verlassen
Und wir gehen ins Gebet,
O, so ist uns Jesus alles:
König, Priester und Prophet!

..........................
..........................
..........................
..........................
..........................
..........................
..........................
..........................

...

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de* JOSEPH M. SCRIVEN *(*1820 – †1886) en Esperanton de Reinhard Pflüger en 2006-08.*

*Arg-372-732 (2008-03-30 23:14:41)*

*Tiu ĉi Esperantigo aperis en la numero 4/2006 de la organo de Kristana Esperanto-Ligo (KELI), en Aŭgusto de 2006.*

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de* JOSEPH M. SCRIVEN *(*1820 – †1886) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2006-08-24.*

*MR-449-1b / Arg-372-727 (2006-08-24 09:22:30)*

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de* JOSEPH M. SCRIVEN *(*1820 – †1886) en la Germanan de* TR. ERNST GEBHARDT *(*1832 – †1899).*

*Arg-372-729 (2006-08-24 09:35:25)*

*Tiun ĉi germanan tradukon mi trovis en la interreto en / Diese Übersetzung ins Deutsche fand ich unter: "http://ingeb.org/spiritua/whatafri.html".*